

# GEPRAF-a Kunsido 2011



Loko: kastelo Grezijono, 49150 St Martin d'Arcé

Dato: 31-an de julio, 2011

Kunvoko: poŝte sendita la 24-an de junio 2011, ret-mesaĝe per la dissenlisto list-gepraf, per la bulteno F8REF 3 semajnoj antaŭe, kaj per la julia revuo Radio-REF.

Ĉeestantoj: Renée Chassard F5RC, Stéphane Fillod F8CFE, Jean-Marie Houvriez F1VY.

Reprezentataj: 5 per respond-kupono, 1 per retmesaĝo

- Georges Bon F5NQW
- Georges Breton F9FZ
- Lionel Naviliat F5IPF
- Richard Schleijsler F5IJX/PA3IJX
- Astride Suss F5TQY
- Gérard Coulon F5NGM.

Personoj estantaj sed ne partoprenantaj:

- René Villedieu, F3VX
- Louis Wazia, F6FQN, prezidanto de ED49
- Maryvonne Houvriez

Komenco de la kunsido ja la 10-a.

La nuna prezidanto, Renata prezentas la agad-raporton, ĉefe la reprezenton de GEPRAF ĉe la ILERA-a kunsido dum la Universala Kongreso pasint-semajne en Kopenhago. Ni gratulas ŝin pro la sekretario posteno kiun ŝi bonvole akceptis en ILERA. Ŝi baldaŭ dissendos la protokolon de tiu kunsido. Por reinformo, ekzistas konvencio inter GEPRAF kaj ILERA, igante ĉiujn GEPRAF-anon kiel ILERA-an membron.

La listo de GEPRAF-aj membroj estas revizita, kun aparta pensaĵo pri la operatoroj kiuj iĝis SK ekde Henriko F9ED : Léo Lentaigne SWL, Hervé Hetet F6HLY, Raymond Roussel F6IUJ, Kléber Sylestre F6AXF (kasisto), Charles Oster F6CLV (matena QSO), Jacques Luce F2JA, kaj Ĵaku Hiblot F5SHE.

Kiel kutime, Georges Bon ĉijare, prizorgos budon ĉe radioamatora renkontiĝo en Marennes.

Aktivo radia, dum unu semajno, de radio-klubo en kastelo Grezijono, Kultura Domo Esperanta, en akompano de Renata, F5RC, Gennadij RW9YE kaj Stéphane F8CFE. La nova respondeculo de la radio-klubo F5KSP estas Stéphane F8CFE.

Pri GEPRAF-a interretejo zorgas Gérard F5NGM.

La agad-raporto estas unuanime akceptita.

Pro la forpaso de la pasinta kasisto, Renata prezentas la aktualan situacion de la kontoj. Estas "CCP" kaj "Livret A" kiuj estas sanaj.

La asembleo transdonas al la prezidantino kaj al la kasisto povon por ricevi la subskribon de ambaŭ kontoj.

Ni dankas Jean-Marie F1VY pro la donaco kiun li ofertis en 2009, paginte dujaran takson de la stacio F5KSP.

La financa raporto estas unuanime akceptita.

La monsumo de la aliĝo ne ŝanĝiĝas, ĝi estas 10€.

Nova komitato, balotita ĉiukonsente:

- Prezidantino: Renée Chassard
- Kasisto: Georges Bon
- Sekretario: Stéphane Fillod

Novaj membroj de la komitato, balotita ĉiukonsente:

- Jean-Marie Houvriez
- Gérard Coulon

Venontaj projektoj:

- Budo en renkontiĝo Hamexpo la 15-an kaj 16-an de oktobro 2011 en Tours. Stéphane F8CFE petas de la organizantoj rezervigon de budo. Renata kaj Jean-Marie zorgas kun Georges F5NQQW pri la loĝistiko kaj bezonaĵo de la budo.
- Investo kaj instalado de antenoj surloke por F5KSP ĉe la kastelo Grezijono. La ideo estas faciligi aktivadon de la kastelo dum mallongaj periodoj (semajnfino, ..) ne farante pezan instalon. Stéphane F8CFE proponas duoblan dupoluson 40-80m fiksitan sur rulbloko (por ne malbeligi la situon) kaj la taŭgan longecon de kablo.
- Laŭ propono de Gérard F5NGM, ni elprovos eblecon de kunsido, kaj per fizika estanteco, kaj per interreta partopreno.
- Aktivado de F5KSP/P far la GEPRAF-anoj.
- Prilaboro de nova QSL karto.